

Christe, pastorum

Brevier-Himno

Komunaj tekstoj > unu pastro > horo de la legaĵoj

*Christe, pastorum caput atque princeps,
gestiens huius celebrare festum,
debitas sacro pia turba psallit
carmine laudes.*

(Pro papa:)

*Quas oves Petro dederas, ovile
orbis ut totus fieret sacratum,
hic tuo nutu positus supremo
culmine rexit.*

(Pro episcopo:)

*Strenuum bello pugilem superni
chrismatis pleno tuus unxit intus
Spiritus dono, posuitque sanctam
pascere gentem.*

(Pro presbytero:)

*Hunc tibi electum faciens ministrum
ac sacerdotem socians, dedisti
dux ut astaret populo fidelis
ac bonus altor.*

*Hic gregis doctor fuit atque forma,
lux erat cæco, misero levamen,
providus cunctis pater omnibusque
omnia factus.*

*Christe, qui sanctis meritam coronam
reddis in cælis, docili magistrum
fac seque vita, similique tandem
fine potiri.*

*Æqua laus summum celebret Parentem
teque, Salvator, pie rex, per ævum;
Spiritus Sancti resonet per omnem
gloria mundum.*

Amen.

Krist', de l' paŝtistoj kapo Vi kaj estro,
vidu: ĉi pastron ni hodiaŭ festas.
Pie ni psalmas kaj laŭorde kantas
himnon kun laŭdoj.

(2-a strofo por papo:)

Por ke sanktiĝu sur la tuta tero
Via ŝafaro, kiun paŝtis Petro,
tiun ĉi papon vokis Vi plej supren,
regi la gregon.

(2-a strofo por episkopo:)

Ĉi episkopon unktis la Spirito
per sankta krismo, per sepopa dono,
por ke per forta mano li defendu
Vian ŝafaron.

(2-a strofo por sacerdote:)

Ĉi sacerdoton, kiun Vi elektis,
faris servanto Vi de l' Di-popolo,
preta helpanto, saĝa kondukanto,
bona nutranto.

Li instruisto estis kaj ekzemplo,
lum' al blinduloj, help' al mizeruloj.
Por nepre savi kelkajn, li fariĝis
ĉio al ĉiuj.

Krist', Vi premias per merita krono
Viajn sanktulojn: Helpu, ke ni vivu
laŭ ĉi mentoro, kaj similan celon
fine atingu.

Laŭd' estu sama al la sankta Patro
kaj al la Filo, Reĝo kaj Savanto,
al la Spirito tra la tuta mondo:
gloro eterna.

Amen.

